

# BioLib - Biologia Libraro

<http://www.biolib.cz/en>

**BioLib** estas paĝoj por specialistoj kaj por la publiko pri ĉio, kio koncernas biologion.

**Nomenklaturetoj** jam ekzistas tie en la lingvoj **angla, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, Esperanto, estona, feroa, finna, franca, germana, greka, havaja, hispana, hungara, Interlingua, islanda, itala, japana, kroata, malteza, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, slovaka, slovena, sveda, tagaloga (filipina), turka** - kaj aliaj eblas.

**BioLib** enhavas ĉirkaŭ 10 mil **esprimojn sciencajn** kaj ĉirkaŭ 4 mil en Esperanto. Ankaŭ multajn bildojn.

Vi povas elekti **kombinon de lingvoj** (Esperanto-hungara, hungara-franca ktp.) laŭ via intereso pri la tuta nomenklatureto aŭ elekti fakon (fungoj, plantoj, animaloj, birdoj, ekvoj k.s.) pere de takson-filtriloj.

Vi povas esti ne nur **uzanto**, sed ankaŭ **kontribuanto**, se vi registriĝos.

## **Kiamaniere labori en BioLib**

La servilo troviĝas en Ĉeĥio, tial oni trovas instrukciojn en la angla kaj la ĉeĥa. Nian klarigon ni bazos sur la angla versio.

Enirinte <http://www.biolib.cz/en> unue registriĝu (Registration). Elektu vian voknomon (Username) kaj pasvorton (Password), kiuj havu 5-35 signojn. Poste neceas via antaŭnomo (Name), familia nomo (Surname), ret-adreso (e-mail) kaj elekto de lingvoj por la sistemo (System Language), por la taksonaj nomoj (Language of Vernacular Names) kaj por la vortaro (Dictionary Language). Nomoj de plantoj kaj animaloj estas komprenataj ĉi tie kiel taksonaj nomoj, nomoj ekz. anatomiaj estas vortara unuo.

Ĉiam, kiam vi eniras BioLib-on kun intenco kontribui, vi devas enmeti viajn voknomon kaj pasvorton kaj konfirmi ilin (Login). La taksonoj aŭtomate aperos en la latina (sciencaj) kaj en la lingvo de vi elektita. Se vi volas sxangxi la lingvon, iru al agordiĝo (Setting).

En la supra dekstra angulo de ĉiu paĝo troviĝas serĉilo (Search), kiu estas agordita por sciencaj taksonoj (Taxa), sed vi povas elekti ankaŭ taksonojn en ĉiuj lingvoj aŭ terminojn. Se vi enskribas siencan nomon, ekz. Aves kaj klakas al OK, aperos paĝo <http://www.biolib.cz/en/taxon/id8304/> pri birdoj en la latino kaj eventuale en traduko al tiu lingvo, kiun vi elektis por taksonoj, kompreneble se la traduko jam ekzistas en la datumbazo. En la fino de la TTT-adreso vi trovas **id8304** - tio estas identiga kodo de la taksono, kiun vi bezonos, se vi volos rigardi liston de ĉiuj birdoj en la datumbazo (en filtrilon vi enskribos kodon 8304 - sed pri tio ni ankoraŭ parolos).

Se la traduko ankoraŭ ne ekzistas kaj vi deziras enmeti ĝin (aŭ pluan sinonimon), klaku malsupre al la vortoj **Add or replace takson vernacular name** (Aldonu aŭ anstataŭigu nacian takson-nomon), elektu la lingvon, kiun vi intencas aldoni (vi povas aldoni tradukojn al ĉiu ajn lingvo, se vi konas ilin), enskribu la tradukon kaj konfirmu (OK). Se vi volas enmeti sinonimon, vi devas ripeti la procedon, la maŝino aŭtomate uzos la unuan enmetitan esprimon kiel la ĉefan, la ceterajn kiel sinonimoj. Simile procedu, se vi volas aldoni sinoniman esprimon sciencan (**Add or replace taxon scientific name**) aŭ se vi volas aldoni taksonon suborditan al tiu, kiu ĝuste estas malfermita (**Add taxon**). Ne forgesu tie unue elekti taksonomian rangon (Taxonomic rank).

**Atentigo:** Se vi ne estas registrita, vi ne vidas la supre menciitajn frazojn (**Add or replace ...**).